



# LA VERDA TRISKELO

2 numéros par an - parution : printemps / automne  
VT 56 - mars 2026



Jen la printempa eldono de nia revuo ! Dankon al la grupo de Lannion kiu sendis multajn artikolojn.  
Bonan legadon al ĉiuj .

## Enhavo

|                      |      |
|----------------------|------|
| Edito                | P 2  |
| La Federacio         | p 3  |
| Lokaj korespondantoj | p 4  |
| Rilate al heredaĵo   | p 5  |
| Ora ulekso           | p 6  |
| Okazis ...           | p 8  |
| ... kaj okazos       | p 9  |
| Anoncoj              | p 13 |
| Omaĝoj               | p 14 |
| Sumoo legado         | p 15 |
| Prelegoj             | p 16 |
| Vojaĝo               | p 19 |

## COTISATION 2026

- y avez vous pensé ? -

Même si vous ne suivez pas de cours,  
même si vous n'êtes pas actif, soutenez  
l'Espéranto et restez informé.

Adressez-vous soit à votre correspondant  
local si vous adhérez à un club, soit à  
Xavier Godivier (coordonnées p.4)  
pour adhérer à la fédération  
uniquement .

## AUX INTERNAUTES

Site internet :

<http://bretonio.esperanto-france.org>

Pour vous inscrire à la liste de diffusion  
Bretonio et ainsi recevoir des nouvelles,  
plus fraîches et plus nombreuses,  
envoyez un message vide à l'adresse :  
bretonio-abono@esperanto-france.org

## Jen la printempo, jen via nova Verda Triskelo!!

Denove multobligos la okazoj esperantumi dum la sekvaj semajnoj kaj monatoj.

Ni unue atendas vin multnombrajn dum la membrokunveno de la federacio en Saint-Brieuc sabaton la 11an de aprilo, por defini niajn estontajn projektojn. Kaj se vi ne povas veni surloke via ĉeesto estos bonvena per interreto!

Vi povos poste plibonigi vian Esperanton kaj ezkzameni en niaj najbaraj regionoj: unue en Greziljono fine de aprilo, kaj poste dum la nacia kongreso de Esperanto kiu okazos en Normandio, de la 22 ĝis 25a de majo.

Aliĝu en la retejo de Esperanto-France!

Kaj por tiuj kiuj pretas vojaĝi iom pli, ĉi-jare la universala kongreso de Esperanto okazos en Aŭstrio komence de aŭgusto. Por tiuj kiuj bezonus financan helpon por la vojaĝ-kosto, pensu peti antaŭ via aliĝo por ke ni informu vin se la federacio povos helpi vin.

Kaj vi poste revenu al Bretonio por ĝui la renkontiĝon de Pluezek' 21-23 aŭgusto.

Bonan legadon de via printempa revuo kaj ĝis baldaŭ en Esperantujo!

*Xavier Godivier*

## C'est le printemps voici le nouveau Verda Triskelo !!

Les occasions de pratiquer l'espéranto vont se multiplier à nouveau au cours des semaines et des mois à venir.

Nous vous attendons tout d'abord nombreux à l'assemblée générale de la fédération à Saint-Brieuc, le samedi 11 avril, afin de définir nos futurs projets. Et si vous ne pouvez pas venir sur place, votre présence en ligne sera la bienvenue !

Vous pourrez ensuite perfectionner votre espéranto et passer un examen dans nos régions voisines : d'abord à Grésillon fin avril, puis lors du Congrès national d'espéranto, qui se tiendra en Normandie du 22 au 25 mai.

Inscrivez-vous sur le site d'Espéranto-France !

Et pour ceux qui sont prêts à voyager un peu plus loin, le congrès mondial d'espéranto aura lieu cette année en Autriche début août. Si vous avez besoin d'une aide financière pour vos frais de déplacement, pensez à en faire la demande avant de vous inscrire afin que nous puissions vous indiquer si la fédération pourra vous aider.

Enfin vous pourrez ensuite revenir en Bretagne pour participer aux rencontres de Plouézec du 21 au 23 août.

Bonne lecture de votre magazine de printemps et à bientôt en Espérantie !

*Xavier Godivier*



dessin : Robin Guinin, [www.facebook.com/LE.ROBINOSCOPE/](https://www.facebook.com/LE.ROBINOSCOPE/)

# FEDERACIO

Notre AG se tiendra le samedi 11 avril à Saint Briec, de 10h à 12h30, suivi d'un repas partagé et d'un moment d'échange l'après-midi.

Le programme pourra être étoffé selon vos propositions !

lieu: Maison des associations, 5 rue Colette Besson.

à l'ordre du jour:

- approbation du rapport d'activité et du rapport financier, ceux-ci seront bientôt sur le site de la FEB.
- Subvention de la participation à des événements espérantistes pour aider les membres qui en ont besoin.
- Subvention à Espéranto-Rennes pour faire face au frais trop élevés de son local par rapport au nombre de membres. Le local qui est aussi le siège officiel de la FEB abrite une importante bibliothèque qui rend nécessaire de le conserver.
- Projets avenir: tournée d'étranger etc.

Vos propositions d'ajout à l'ordre du jour sont les bienvenues.

La fédération a besoin de renouveler ses actifs qui en assurent le fonctionnement depuis trop longtemps et pour certains sont trop accaparés par d'autres responsabilités associatives. Merci de penser à proposer votre aide : devenir membre du CA n'est qu'un premier pas pour donner son avis et participer au fonctionnement de la FEB chacun selon vos disponibilités, ponctuellement ou régulièrement.

## Lokaj korespondantoj kaj kursoj.

|    |                         |                             |                |                                     |
|----|-------------------------|-----------------------------|----------------|-------------------------------------|
| 22 | Armor Esperanto         | Murielle Caré               | 06 70 60 58 18 | murielle.care(a)me.com              |
| 22 | Saint-Brieuc            | Laurent Peuch               | 06 89 86 12 97 | ltpeuch(a)hotmail.com               |
| 22 | Plouézec                | Jeanne Pouhaer              | 09 62 30 40 05 | jeanne.pouhaer(a)orange.fr          |
| 22 | Locquémeau-Cavan        | Anne Desormeaux             | 06 04 01 27 64 | anne_desormeaux(a)yahoo.fr          |
| 22 | Lannion                 | Maja Mériaux                | 06 04 49 84 48 | meriaux.family(a)wanadoo.fr         |
| 22 | Pleudaniel              | Pierre Cardona              | 06 99 38 20 89 | kortep(a)gmail.com                  |
| 22 | St Michel-en-Grève      | Hélène Dubois               | 02 96 35 73 06 | helene22dubois(a)gmail.com          |
| 22 | Rostrenen               | Françoise Noireau           | 06 09 12 03 74 | desirdapprendre(a)gmail.com         |
| 22 | Dinan                   | Philippe Stride             | 02 96 27 87 43 | <u>philippe.stride(a)wanadoo.fr</u> |
| 29 | Douarnenez              | Chantal Allen               | 06 74 15 78 09 | chantalallen9(a)gmail.com           |
| 29 | Morlaix                 | Claudine Guégen             | 06 86 88 44 69 | Esperantosolidareco(a)gmail.com     |
| 35 | Rennes                  | Xavier Godivier             | 06 51 45 84 83 | xgodivier(a)esperanto.org           |
| 35 | Montfort-sur-Meu        | Josette Ducloyer            | 06 35 32 02 00 | jpducloy(a)gmail.com                |
| 35 | St Malo                 | Anne-Marie Argney           | 02 99 40 24 86 | amargney(a)gmail.com                |
| 56 | Hennebont               | Yvette Veslin               | 02 97 36 08 75 | herve.veslin(a)orange.fr            |
| 56 | Lorient                 | Jean dit Yannick Le Guennec | 06 78 59 98 56 | jean.le-guennec(a)wanadoo.fr        |
| 56 | Hennebont+Lorient       | Claude Bensimon             | 06 22 08 29 32 | cloesb(a)yahoo.fr                   |
| 56 | Pontivy                 | Marielle Giraud             | 02 97 27 76 98 | liber.terre(a)wanadoo.fr            |
| 56 | Rhuys                   | Francis Desmares            | 02 97 26 89 96 | francismsg56(a)gmail.com            |
| 44 | Nantes                  | Bruno Robineau              | 02 40 98 78 76 | brobineau(a)orange.fr               |
| 44 | St Aignan-de-Grand Lieu | Solange Goan                | 06 81 18 30 12 | somigoan(a)gmail.com                |
| 44 | Couëron                 | Luc Gouverneur              | 06 30 03 00 98 | coueron-esperanto(a)orange.fr       |
| 44 | Herbignac               | Jean-Yves Santerre          | 02 40 88 96 98 | jys.mys(a)club-internet.fr          |
| 44 | St Nazaire              | Chantal Barret              | 02 40 01 97 27 | patchdomo(a)yahoo.fr                |

NB- "(a)" est utilisé à la place de "@" dans les adresses courriels données dans le VT pour éviter que ces adresses soient spammées suite à la diffusion du VT sur Internet.

On a pu faire des erreurs de copie, veuillez contrôler vos coordonnées et si vous constatez des erreurs ou changez de coordonnées, veuillez en aviser Josette Ducloyer. Merci d'avance !

**Le VT est diffusé par internet.** Cependant, nous encourageons les responsables de club à en imprimer un exemplaire lors de la diffusion pour que les membres soient sensibilisés à sa sortie.

## Rilate al heredaĵo

*De nove kelkaj leteroj kiujn Gaby Tréanton ricevis de siaj esperantistaj korespondantoj.*

**1981-1984**

**Guy B. Tordoff. Bristol. Britio. 20.01.1981**

Evidente en nia epoko la du elstaraj malbonoj estas naciismo (patriotismo) kaj maltoleremo.

Naciismo konsistas el dividado de la tuta homaro en apartajn grupojn - ĉiu grupo nomas sin per romantika nomo, kaj ĉiu naskito devas lojale doni sian vivon por sia grupo, kaj ĉiujn aliajn grupojn oni nomas malamikojn.

La celo de ĉiu grupo estas batali por la riĉoj de la tero. Kaj oni instruas al ĉiu homo adori la Dion de perforto kaj milito, kiu estas plej alte honorata.

La vivocelo estas konkuri por la riĉoj de la tero, kaj perforti kaj militi por akiri lukson kaj altan vivnivelon. Kooperi kaj dividi juste la teron neniu volas.

Kaj la dua tasko por la hodiaŭa homo estas toleri. Ni devas lerni kunlabori kaj kompreni ĉiujn homojn, ĉar ili estas egale niaj fratoj sur la tero.

**Eva. Budapeŝto. Hungario. 01.01.1984**

Kara Gaby, mi ekridetis leginte en via letero : « Ĉu vi konas la vorton kvakero ? ». Jam de pli ol dek jaroj mi havas intiman kontakton kun kvakeraj esperantistoj, kaj regule ricevas la modestan, sed ĉiam tre valoran revueton « Kvakera Esperantisto ». Lastan fojon kun ĝojo mi rimarkis ankaŭ vian nomon en ĝi. Krome ankaŭ mia edzo, kiu estas tre malfermita, tute ne rigida ekleziulo, ricevas regule la germanlingvan revuon de la kvakeroj el Vieno. Mi eĉ partoprenis pasintan aŭtunon en GDR jarkunvenon de la kvakeroj kaj mia simpatio multe plifortiĝis.

Kara Gaby, ankaŭ mi bedaŭras, ke vi ne povis partopreni UK-on en Budapeŝto, sed se vi havas emon iam ajn veni al nia lando, mi volonte ofertas ĉiun mian helpon ! En Budapeŝto vi nepre povas loĝi ĉe ni kiel amiko !

**1983-1987**

**Karl kaj Anna Ulström. Stockholmo. Svedio. 10.03.83**

La foto montras nian kuirejon, apud Anne estas lavmaŝino. Kiam mi lavas, mi rulas ĝin al proksimeco de akvo. Dum la lavmaŝino aŭtomate laboras, ni povas okupi nin alimaniere, ĉar ĝi aŭtomate haltas.

Gaby, ni vere bone vivas, ni promenadas matene en proksima haveno, ni havas 300m al la akvo. Nun ne estas granda ŝiparo ĉi tie. Grandparte estas nur la libertempboatoj, motoraj kaj velaj. Per la monataj vojaĝkartoĵoj ni aŭtobusas aŭ trajnas diversloken. Ni havas tre proksime ŝipon al Finnlando aŭ al insulo Aland. Facile ni aŭtobuse atingas la proksiman arbaron por berkolektado. Mi multe fiŝkaptas kaj ni havas ankaŭ belan arbaron kun lagoj proksime por ĝui la libertempon.

12.11.87

La bildo supren montras nian urbo-domon. Ĝi situas bele ĉe la akvo. Nia urbo vere bele situas. Ĝi parte estas sur insuloj. Pro tio la turistoj ŝatas ĝin kaj miras ke ni fiŝkaptas pluloke en la urbo centro. Eĉ salmojn ni povas kapti.

Vi certe scias, ke de Göteborg ni povas ŝipi al Ŝtokholmo tra kanaloj, lagoj kaj kluzoj, trapasante sub la ponto kiun vi vidas sur la bildo. Anna kaj mi faris tion pasintjare ! Vere ĝuiga tritaga ŝipado !



*Ĉu vi memoras, ke en la VT n°54 ni prezentis la gazeton “ORA ULEKSO” (ajonc d’or)? Ĝi estis eldonita de la klubo de Rennes de 1951 ĝis 1965. La redaktoro estis Clément Martin. Aperis 98 numeroj, kiuj la plej ofte temis pri bretona geografio kaj estis interesaj por turismi tra nia regiono.*

*Anne-Marie Argney, de la klubo de Saint-Malo, donacis al nia federacio kelkajn ekzemplerojn, kies artikoloj iom post iom estas retajpitaj de Chantal Allen. Jen pri Vannes, verkita en 1954.*

*En tiu epoko, estis modo esperantigi la proprajn nomojn. Ankaŭ la stilo estas peza kaj eksmoda, sed estos okazo por la nunaj lernantoj reverki ĝin laŭ pli malpeza stilo!*

*Ekzemple, Vano estas la urbo Vannes, Joslen estas Josselin, Olivje estas Olivier, Ŝarje estas Charier.....*

*La urbodomo estas nomita urbopalaco ĉar ege luksa. Ĝi estis konstruita en 1886 laŭ franca stilo Renesanco.*

*Josette kaj Chantal.*

### ORA ULEKSO no 26 – Junio ĝis aŭgusto 1954

Vano estas la ĉefurbo de la departemento Morbihano. Tiu urbo estas sur la rivero Marl, sed tiu ĉi nomo ne estas uzata.<sup>1</sup>

Parolante pri tiu rivero oni diras ĉiam : la Vanriveron. Tiu rivero formas malgrandan havenon antaŭ ol alveni ĉe Konlo en la Morbihanan golfon. El Vano ĝis la Atlantika Oceano estas 16km. Vano entenas du partojn tre diferencajn : la malnovan urbon kaj la modernan urbon. La unua, kie troviĝas la katedralo estas konstruita en formo de amfiteatro kaj ĉirkaŭita de fortikaĵo. La stratoj estas mallarĝaj kaj malrektaj. La dua urbo ĉirkaŭas la unuan. Vano estis la ĉefurbo de Venetoj, kiuj kontraŭstaris Julion Cezaron, 50 jarojn antaŭ Jesuo Kristo. Tiu riskis batalon kontraŭ Venetoj vidalvide al Lokmariaker, kiu nomiĝis tiam Darioriguni'on. Estis Romianoj, kiuj faris la vojojn kondukantajn al Korseul, Anĝerso, Hennebont, Lokmariaker, Reno kaj Nanto. Johano la 4a konstruigis la belan kastelon « Hermine ». En tiu kastelo li internigis sian malamikon Olivje de Klison.

La urbopalaco de Vano estas belega kaj moderna konstruaĵo laŭ franca renesanco stilo. Tiu rimarkinda monumento estas la verko de Ŝarje [Charier] arĥitekturisto [arkitekto], kiu loĝis en tiu urbo. La eksteraj skulptaĵoj de la ĉefa frontono, same kiel la kvar bustoj de la ĉefa enirejo estas la verkoj de Tjebo [Thibault] La balustrado formanta kronon de la sonorilturo estis verkita de l'fratoj Moro [Moreau]. La interno estas vizitinda.



<sup>1</sup> Ĝi ja estas uzata nuntempe





Urbopalaco de Vano-Teretaĝo- En la ĉambrego de la paŝadejo estas la statuoj de Lukrecio de Eudes, de la Patrineco. Tiuj verkoj estas de Daniel Dupuis. Oni vidas ankoraŭ dekstre apud la ŝtuparo, la rajdan statuon de Olivje de Klison. Tiu statuo, kiu estis donaco de duko de Rohan, estas reproduktita [*kopio*] de tiu, kiun oni povas vidi en la Joŝlen-kastelo. La ŝtupoj kiuj kondukas al la unua etaĝo estas el flava marmoro. La skulptaĵoj de la korbvolbo estas la plej belaj el la verkoj de Kruŝe [*Cruchet*], kiu konkursis je la dekoracio de la palaco Luvro [*Louvre*] en Parizo. Estas ankoraŭ belega fenestra kolorvitraĵo, kiu ricevis la grandan Premion de la Internacia Konkurso dum la jaro 1885. Tiu verko reprezentas la edziĝon de Anjo [*Anne*] de Bretonio kun reĝo Karlo VIIIa



Urbopalaco de Vano- Unua etaĝo- La mozaikoj faritaj en Poitiers, de Pabausi estas laŭde citendaj. Ĉe la enirpordoj estas artaj feraĵaroj. La seruroj kaj artaj ferumaĵoj estas ankaŭ tre belaj. La unuŝtonaĵaj kolonoj de l'arkadoj de la granda ŝtuparplaceto estas el polura ŝtono. La bronzoj de la granda ŝtuparo kaj de la loĝisto estas la reprodukto [*kopio*] de tiuj, kiuj ornamas la apartamenton dirite [*alnomata*] de Ludoviko XIVa en Versajlo-palaco. En la festoĉambro, riĉe dekoraciita estas necese rimarki la superaltajn panelojn el Koma marmoro de la la grandaj kamenoj, kiuj estas unikaj en Francio kiel antikva flavo. Ili estis realigitaj en masivaj blokoj el marmoro de Farfuri (Farfour), la plej reputaciega konata marmoristo. La ĉambrego de la edziĝoj dekstre kaj tiu de l'urba konsilo, maldekstre, estas ornamitaj per belaj tapetoj kaj kamenoj el Pireneaj marmoroj.

Dua etaĝo – Norda paviliono – Publika biblioteko entenanta pli ol 10 000 volumojn. Multaj el ili elvenas el abatejo Sta Gildas de Rhuys kaj abatejo Priere apud Muzilak [*Notre-Dame-des Prières près de Muzillac*] En la suda paviliono estas malgranda muzeo entenanta kelkajn belajn pentraĵojn.

Apud la urbopalaco oni vidas la liceon Jules Simon. En tiu ĉi liceo, kiu estis tiam gimnazio, Lesage, Desforges, Maillard, Kadudal kaj Auguste Brizeux estis lernantoj.

Vidalvide al la urbopalaco estas la strato Emilo Burgo, kie oni povas vidi je la 23a numero la malnovan pordon ekzistantan de post 1429. Ĉe la ekstremaĵo de tiu strato estas la placo de Henriko la 4a. Ĉirkaŭ tiu placo oni admiras malnovajn domojn el ligno, kiuj havas pintajn ĉevronajn frontonojn kaj etaĝojn superelstarantajn la placon. Tiuj domoj estas tre bone konservataj. La dekoracio estas respektinda kaj intima.

E. Le Coze

Port-Navalo (Morbihano)

## Okazis ... Dutaga kurso de Dennis Keefe en Saint-Brieuc

En novembro 2025, nia asocio Armor-Esperanto invitis usonanon Dennis Keefe por gvidi studperiodon por la instruistoj de Esperanto ĉar li havas grandan sperton pri instruado pli specife andragogio (instruada arto al plenkreskuloj), kiu iom malsimilas al pedagogio. La unua etapo por ke li akiru tiun sperton estis lernado de fremdaj lingvoj : li bone scipovas plurajn eŭropajn lingvojn kaj ankaŭ lernis la ĉinan lingvon ĉar li laboris dum multaj jaroj en Ĉinio.



La kurso konsistis el pluraj preletoj kaj trejnadoj pri :

- historio pri diversaj metodoj por lerni/instrui lingvojn (krom Cseh kaj Zagreba metodo) : ĉefe Berlitzza metodo sed ankaŭ Tut Korpa Responda metodo kaj Gouin metodo de serioj.
- BEK kurso bazita sur dialogoj celantaj paroligi la lernantojn kiuj alterne rolludas ( demando – respondo )
- rekomendoj pri kiel uzi bildojn, reklamojn, filmojn, revuojn ( ekz : Unesko revuo en Esperanto), rekomendoj pri korektado aŭ ne dum la lecionoj.

Fine de la unua tago Dennis prelegis pri la organizado de lingvo-festivaloj, en la franca ĉar tiu prelego estis malfermita al ne-esperantista publiko. Li tre bone sukcesis kvankam delonge li ne plu kutimas paroli la francan lingvon !



Je la fino de la studperiodo, ni diskutis kaj interŝanĝis pri metodoj por varbi favore al Esperanto : la konkludo estas ke ni povas allogi homojn danke al lingvo-festivalo kaj tuj proponi fulmkursojn al la homoj kiuj interesiĝis pri Esperanto dum la festivalo.

Post tiu kunveno en Bretonio, Dennis elpensis novan retan kurson kaj lanĉos ĝin en februaro 2026.

Kutime, Dennis laborigas lernantojn dum pluraj semajnoj eĉ monatoj, kelkfoje ok horojn tage en Esperanto.

Ĉifoje, dum dutaga sesio, li adaptiĝis por prezenti diversajn metodojn kaj ankaŭ trejnigi nin. Ni tiam konsciis ke ni povas instrui al diversnivelaĵoj lernantoj per sama materialo.

Ni konas la ŝlosilon por efike lerni : « Lernantoj aŭskultu nur Esperanton dum longa tempo ». Ni ĉiuj konsentas teorie sed ĉu ni serioze praktikas tion en niaj kluboj?

Ni provu ! Ni strebu ! Ek...



*Amapola Triguero kaj Murielle Caré  
St-Brieuc decembro 2025*

## ... Kaj Okazos.

**Gresillon – de la 17a ĝis la 26a de Aprilo.**



Venu studi Esperanton kun famaj instruistoj el 4 landoj en 4 niveloj! Eblas KER-ekzameniĝi. Fine de aprilo dum la francaj ferioj. Prezo normala aŭ reduktita. Vidu <https://gresillon.org/p?lang=eo>

Venu bicikladi, kanti koruse, studi la Biblion Esperante! Komence de majo dum la francaj ferioj. Eblas kun aŭ sen reduktita. Vidu <https://gresillon.org/k?lang=eo>

Se vi ne povas mem veni, tiam bonvolu informi kaj instigi amikojn.

Vi povas finance subteni Greziljonon, kiu invitas e-istajn familiojn kun infanoj, kiuj fuĝis sian landon pro milito.

Vidu nian jaran agendon/kalendaron en <https://gresillon.org/a?lang=eo>

Eblas aliĝi per retmesaĝo al <kastelo ĉe [gresillon.org](https://gresillon.org)>, telefonvoko aŭ nia reta aliĝilo [ĉi-tie](#).

Amike salutas la teamo de la Esperanto-Kulturdomo en kastelo Greziljono en 49150 Baugé-en-Anjou, Francujo  
[kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org), 02.41.89.10.34 (respondilo)

Venez étudier l'espéranto avec des professeurs renommés de 4 pays et à 4 niveaux ! Vous pouvez passer l'examen CECR. Fin avril, pendant les vacances scolaires. Tarif normal ou réduit. Lire d'avantage  
: <https://gresillon.org/p?lang=fr>

Venez faire du vélo, chanter dans une chorale, étudier la Bible et l'espéranto ! Début mai, pendant les vacances scolaires. Tarif réduit possible. Lire davantage : <https://gresillon.org/k?lang=fr>

Si vous ne pouvez pas venir, parlez-en autour de vous et transférez ce message !  
Vous pouvez soutenir financièrement Grésillon, qui accueille des familles e-istes avec enfants ayant fui leur pays à cause de la guerre.

Consultez notre agenda annuel sur <https://gresillon.org/a?lang=fr>

Inscrivez-vous par courriel à <kastelo êe [gresillon.org](mailto:gresillon.org)>, par téléphone ou via notre formulaire d'inscription en ligne [çi-tie](#).

Salutations de l'équipe du Centre culturel espérantiste du château de Grésillon, 49150 Baugé-en-Anjou  
[kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org), 02 41 89 10 34 (répondeur)

## **Anonco por la 24-an de junio 2026**

La grupo de Esperanto de Lannion proponas posttagmezon al la **Sovaĝa Rezervejo de Ploubezre**.

- 16h – 18h30 : Gvidata promenado tra la rezervejo, en Esperanto, kun volontuloj de ASPAS.

- Ekde 19h : Komuna manĝo kun manĝaĵoj kaj trinkaĵoj alportitaj de ĉiuj.

**Rendevuo je la 15a en la salono « Salle du Guindy » en Buhulien** (22300, apud Lannion), por forlasi la provizojn kaj organizi la kunveturadon.

Por scii pli pri tiu Rezervejo, bonvolu legi la artikolon en tiu revuo.

La grupo de Lannion

## Les Estivales de Plouézec 2026

Les Estivales de Plouezek se tiendront sur 3 jours cette année : **vendredi 21, samedi 22 et dimanche 23 août** salle Ostréa, place des Droits de l'Homme, à Plouézec (22).

Elles vous invitent à 3 jours d'activités et de réjouissances:

- Cours en 5 séquences de 2h adaptés à chaque niveau
- Tourisme côté mer: Sorbonne plage, côté terre: le temple de Lanleff, la chapelle de Kermaria et sa célèbre danse macabre
- Jeux en Esperanto et découverte de la boule bretonne
- Participation aux festivités locales le week-end (spectacle et danses bretonnes), une belle occasion de faire découvrir l'Esperanto aux gens du village !

Nos amis népalais Népalais Rajani et Narendra Raj Bhattarai participeront à nos Estivales. Parmi nos invités, Ewa Grochowska, lauréate de nombreux concours, dont l'œuvre littéraire a été récompensée en 2025 à Brno lors de la remise des prix du *Belartaj Konkursoj* avec deux chants *Nedeca tango* et *Ĝuu la vivon*.

Participation de Chantal Allen

### Les repas seront pris dans la salle Ostréa : prix par personne

Vendredi midi : repas tiré du sac, chacun apporte ses provisions.

Vendredi soir : paleron de porc confit 14 € ou menu végétarien : 7,50 €

Samedi midi : salade composée 6 €

samedi soir : colombo de volaille 14 € ou menu végétarien : 7,50 €

Dimanche midi : choucroute de la mer 16 €

Chaque matin, y compris le vendredi, entre 8 h 30 et 10 h 00, il sera possible de venir préparer et prendre son petit déjeuner dans la salle Ostréa.

### Participation aux frais d'organisation:

15 € par jour et par participant, les débutants bénéficiant du tarif réduit de 5 €/jour.

### Bulletin d'inscription ci-dessous

Informations complémentaires : à demander à Noël Reysset

[npreysset@hotmail.com](mailto:npreysset@hotmail.com) ou 07 83 10 83 68

(Important : ne pas utiliser son ancienne adresse de messagerie qui a été piratée).

### Inscriptions accompagnée du paiement à faire parvenir à :

Plouézec Espéranto

Chez Jean Yves Jégou

7 rue de la fontaine 22400 Coëtmieux

[jegoujy@yahoo.com](mailto:jegoujy@yahoo.com)

Paiement par chèque à l'ordre de : Plouézec Espéranto



Trois niveaux sont proposés pour les cours : N1 : débutants, N2 : progresantoj, N3 : babilantoj.

**Participant 1**

|                                              |
|----------------------------------------------|
| Nom                                          |
| Prénom                                       |
| Adresse postale                              |
| Adresse de messagerie                        |
| N° de téléphone                              |
| Niveau choisi pour les cours (N1, N2, ou N3) |

**Participant 2**

|                                              |
|----------------------------------------------|
| Nom                                          |
| Prénom                                       |
| Adresse postale                              |
| Adresse de messagerie                        |
| N° de téléphone                              |
| Niveau choisi pour les cours (N1, N2, ou N3) |

| Participation aux frais d'organisation | Participation journalière (15 ou 5 €) | Nb de personnes      | total |
|----------------------------------------|---------------------------------------|----------------------|-------|
| Vendredi                               |                                       |                      |       |
| samedi                                 |                                       |                      |       |
| dimanche                               |                                       |                      |       |
|                                        |                                       |                      |       |
| <b>Commande de repas</b>               |                                       |                      |       |
| Vendredi soir                          | 14 €                                  |                      |       |
| Vendredi soir menu végétarien          | 7,50 €                                |                      |       |
| Samedi midi                            | 6 €                                   |                      |       |
| Samedi soir                            | 14 €                                  |                      |       |
| Samedi soir menu végétarien            | 7,50 €                                |                      |       |
| Dimanche midi                          | 16 €                                  |                      |       |
|                                        |                                       | <b>Total à payer</b> |       |



## Semajno de la vivantaj lingvoj

La Ministerio pri Nacia Edukado organizas la 11an semajnon de la vivantaj lingvoj de la 23<sup>a</sup> ĝis la 28<sup>a</sup> de marto 2026 en elementaj lernejoj, mezlernejoj kaj liceoj. Estas oportuneco por konigi Esperanton al junuloj ! Okazos tiu evento en Rostrenen kaj ankaŭ en la mezlernejo de Mordelles (Ille-et-Vilaine), kie Pierre Pennequin, instruisto pri fiziko kaj kemio en tiu mezlernejo kaj esperantisto respondos al demandoj de la lernantoj kaj prezentos ekspozicion pri Esperanto.

Josette

## Semaine des langues 2026 – Rostrenen

Du 6 au 10 avril 2026, Rostrenen célèbre la diversité des langues et des cultures à travers une semaine d'activités ouvertes aux scolaires et au public.

Ateliers, rencontres, cuisine, musique et échanges polyglottes : une invitation à découvrir le monde à travers les langues et à renforcer les liens entre cultures, générations et habitants.

Découverte et animations autour de nombreuses langues et écritures :

**\*Espéranto\*** , portugais, néerlandais, espagnol, breton, persan, gaélique, morse, toki pona, poésie sur drapeaux, jeux autour des mots... et d'autres surprises.

Organisée par l'école publique et l'Espace de Vie Sociale "Les Gens", cette 11<sup>e</sup> édition met l'accent sur la dimension éducative, culturelle et sociale de la diversité linguistique.

## Festivalo Breskebil pri minoritaj lingvoj.



## DOUARNENEZ 26-an de septembro 2026 apud Les Halles

Post sukcesa evento 2025, asocio *Rhizomes*, organizas la festivalon kun ĉefa temo : la duoninsulo de la lingvoj de la mondo, kun kantoj, poezioj kaj multaj budoj. Ĉeesto de lingvoj pasintjare : la angla de Kornvalo kaj Jamajko, bretona, plurilingva kafejo, Dargine de Dagestano, dana, eŭska, hispana de Meksiklando, **esperanto**, finna lingvo, hungara, indonezia, inuktitut, itala, japana, nahatl, napolita, nederlanda, pola, portugala de Portugalujo, rusa, sasak de insulo de Lombok kaj ĉeĥa.

Ĉu vi deziras partopreni en la festivalo kaj kontribui al la budo de Esperanto ?

Kontaktu Ŝanjo-n ([chantalallen9@gmail.com](mailto:chantalallen9@gmail.com))

## Memore al Anne Jausions



Karaj,

Mi transsendas al vi la mesaĝon, kiun mi sendis al Claude Jausions.

Mi ankaŭ memoras, ke Anne Jausions estis en Pluezeko, en 2004 aŭ 2006, mia ekzamenanto por la atesto pri elementa aŭ praktika lernado. Eble por la du, sed pli verŝajne por la dua, ĉar por la unua mi memoras pri Gaby Tréanton. Jam dudek jarojn! Alia epoko, sed nur bonaj memoraĵoj, dankon al vi ĉiuj. Pluezeko restos ĉiam en mia koro.

Amike,

Bernard

Kara Claude,

Okaze de la Mediteranea Esperanto-Semajno, en 2022, Anne Jausions montris sian gravan pedagogian kompetentecon en Esperanto-literatura fako. Danke al ŝi, mi samtempe malkovris per nova flanko la riĉecon de la literaturo de nia elektita internacia lingvo kaj efikan metodon por eniri en ĉiun verkon. Do grava momento en mia Esperanto-vivo.

La anonco de la forpaso de Anne do aparte tuŝis min. Tamen danke al sia mirinda sindediĉo al Esperanto, literaturo kaj pedagogio, ŝi restos vivanta en mia memoro.

Mi aŭdacas pensi, ke la plej bona maniero honorigi la memoron de Anne Jausions estas komuniki la artikolon, kiun mi redaktis post ŝia kurso okaze de la Mediteranea Esperanto-Semajno, en 2022, kiu aperis en la raporto starigita de Andreo Grossmann, redaktoro de La Informilo, inform-bulteno de Orient-Franca Esperanto-Asocio (Alzaco kaj Loreno), n-ro 197. Vidu ĉi-poste.

Mi prezentas al vi kaj al ĉiuj, kiuj amis Anne Jausions, miajn sincerajn kondolencojn.

Bernard Behra

## Interesa kurso pri literaturo

Okaze de la Mediteranea Esperanto-Semajno, de la 26a de Februaro ĝis la 5a de Marto 2022, en Les Issambres, Lazura Marboro, Anne Jausions dum sia ĉiutaga kurso prezentis multajn verkojn originale verkitajn en Esperanto laŭ tute ne kutima maniero. Ŝi donis por ĉiu verko nur la komencon de la libro, ĉirkaŭ 15 ĝis 25 liniojn. Post legado de la proponita teksto, ni demandis pri la nekonataj vortoj kaj esprimoj kaj konsideris la stilon kaj provis diveni, kie disvolviĝas la rakonto, kaj pri kio temas. Sekve ni kune serĉis la aŭtoron kaj la titolon de la verko.

Tio estis ĉiufoje interesa enketo, kelkfoje preskaŭ kiel detektivo, aparte, kiam neniuj el ni legis la libron. Tiel la kursanoj bone partoprenis, dividinte iliajn komprenojn kaj sciojn pri la signifoj de vortoj kaj esprimoj, substrekinte diversajn aspektojn de la tekstoj, pri la stilo, vorto-trezoro, gramatikaj formoj. Ni tiel malkovris kaj konsciis, ke la komenco de literatura verko donas multajn informojn gravajn por kompreni, kelkfoje intuicie, kion la aŭtoro celas esprimi pri sentoj, etoso, pens-manieroj, kutimoj, moroj. Ankaŭ la verkisto priskribas per tiuj unuaj vortoj la naturon, veteron, travivaĵon de la ĉefaj rolantoj, kelkfoje per terura se ne ŝoka prezento de tragedia situacio.

Pro tiom da malkovroj, pri tiuj tekstetoj en la komenco de libro, kiujn oni ofte nur rapide tralegis por decidi, ĉu oni emas daŭrigi laŭ ne legi libron, ni travivis la kurson de Anne Jausions kiel amuzan ludon. Kelkaj kursanoj friponis serĉante per komputilo, ne nur la signifon de nekonataj vortoj, sed ankaŭ, kiuj estas la titolo kaj la aŭtoro de la libro, el kiu estis elŝutita la prezentita teksto.

La kurs-gvidantino sciis bone uzi la demandojn, komentojn kaj proponojn de la partoprenantoj por riĉigi la kurson. Kaj ankaŭ ŝi lerte akceptis la intervenon de la komputiloj, nome por doni pli da biografiaj informoj pri la aŭtoroj kaj iliaj aliaj verkoj. Ni konstatis, ke komputilo, fakte interreto, estas interesa ilo por rapidigi serĉadojn, do por pli bone studi literaturon : ne malmultaj verkoj estas elŝuteblaj parte aŭ tute, kaj oni povas trovi prezentojn de aŭtoroj kaj recenzojn.

La partoprenantoj, fine de la kurso, interkonsentis, ke ili travivis interesan sperton dum tiu semajno kaj neniam plu legos la komencon de verko laŭ la sama maniero. Oni ankoraŭ povis listigi por si mem legendajn librojn.

Bernard Behra

Masevaux, Alta Alzaco, la 12an de Marto 2022.

## Sumoo legado.

### RAKONTOJ PRI ĈINA TEO de Wang Xufeng

Okaze de januara Sumoo Legado, mi viŝis la polvon de verda kovrilo, tiel aperis la titolo de la libro: *Rakontoj pri Ĉina Teo* de Wang Xufeng. Estis donaco de kara amikino, Perfekt Ĝoja, kiu faris la tradukon.

La enkonduko *Min trinkis teo*, kompreneble, surprizis min. Por ĉinoj, teo ne estas ordinara trinkaĵo, sed ĝi intime rilatas al la spirita mondo. Oni parolas pri te-amantoj.

Laŭ Wang, teo ne estas panaceo sed pura akvo, kiu celas kvietigi la homan koron en ĥaoso. Wang parolas pri magia konfuzanta trinkaĵo, kiu ravis sin, kaj finfine ŝi sciis klare, ke ŝi ne trinkis teon, sed sin trinkis teo. Tiel scio de homeco enkorpiĝas en la vasta kaj profunda verda mondo.

### GIGANTAJ TE-ARBOJ

Pri la deveno, en fora pasinteco, la te-arboj naskiĝis kiam pereis la dinosaŭroj. La latina nomo *Thea sinensis* atestas ke la te-arboj originas en Ĉinio, ĉefe en la Yunnan-provinco. Ili apartenas al la familio de kamelioj.

En la 70-aj jaroj, fakuloj trovis en la ĝangalo te-arbaron, jam konita de lokanoj. Ĝi aperas kiel la viva fosilio de antikvaj te-arboj kaj la heredaĵo de praŭloj. Ili apartenas al supera formo de planto, ili etendas siajn branĉojn al ĉielo kaj staras 'kiel gigantaj dioj en fabeloj'. Pro tio, oni uzas la pronomon 'li' anstataŭ 'ĝi'.

La plej granda arbo jam trovita estis 'la avo de la te-arbo', aĝis 1700 jarojn, altan pli ol 32 metrojn, kun branĉoj al ĉielo. Bedaŭrinde en 2013 ĝi mortis nature. Sed antaŭ nelonge estis trovita la plej malnova sovaĝa te-arbo sur la monto Ailao, altas je 25 metrojn, krone 22 metrojn.

La te-arbo kreskas en pra-arbaro, kune kun aliaj sovaĝaj te-arboj, ĝi formas sovaĝan te-arbaron de 20 kvadratajn kilometrojn, ĝi estas konsiderata kiel la plej vasta biotopo kun te-arboj kiel la ĉefaj elementoj.

### LA UNUA INTIMA KONTAKTO

Laŭ la ĉina mitologio, la heroo Shennong estis la unua kiu uzis teon kiel trinkaĵon. Li havis grandajn okulojn sub densaj brovoj kaj la barbo kaj la hararo estis densaj. Li estas vestita per bestofelo kun du bovaj kornoj sur la kapo.

Laŭ legendo Shennong naskiĝis antaŭ pli ol 6000 jaroj. La patrino vidis ŝtonan drakon, kaj emociita ŝi estis gravigita. Shennong altis preskaŭ 3 metrojn, havis drak-vizaĝon. Li fariĝis gvidanto de pratempaj triboj. Estas multaj legendoj pri la rilato inter Shennong kaj teo.

- La ventro de Shennong estis travidebla. Li glutis folion kaj vidis ke la folio frotpurigis la stomakon kaj inteston kaj toksoj estis eliminataj.

- Shennong zorgis pri malsana legenda besto Zhangŝu per frotado de te-folio. Ĝi resaniĝis. Poste Shennong ekgvidis homojn planti arbojn.

Legendoj pri Shennong enkorpiĝas la originon de la rilatoj inter teo kaj homo kaj montras la transiron de la ĉina primitiva socio de plukado, fiŝado kaj ĉasado al plantado kaj agrikulturo.

*Legu kaj ĝuu*

Ŝanĝo

## Prelego, artikolo.

### Prelego de Nicolas Legendre

La 25-an de novembro 2025, Michel kaj mi ĉeestis la prelegon de Nicolas Legendre en Carré Magique en Lannion, kun proksimume 400 partoprenantoj. Tiom da homoj por aŭskulti prelegon, ni neniam vidis antaŭe! Nicolas Legendre estas sendependa ĵurnalisto. Inter aliaĵoj, li kunlaboras kun *Le Monde*. Antaŭ la prelego, ni jam legis lian libron « Silence en la kampoj ». Dum sep jaroj da enketoj ĉe la agro-industrio en Bretonio, li kolektis multege da atestoj. Li konstruis sian libron per ĉirkaŭ 300 inter ili, denuncante la malagojn ĉe la bretona agro-industrio. Li klarigis kiel la agra revolucio, ekde la 1960-aj jaroj, laŭ la progreso, kreis uzinojn kaj oficojn. Kontraŭe, ĝi okazigis malpliigon de la agraj landaranoj kaj biodiversecan detruon. El tiuj malagoj de la agro-industrio en Bretonio profitas nur kelkaj homoj en malkompatema sistemo, kie superregas perforto, silento kaj malklaraj ligoj inter ekonomio kaj politiko. Dum sia prelego, li klarigis, kiel tiu perforta situacio kreskis, ĉefe la lastajn jarojn. Laŭ la preleganto, du frazoj gravas, kiujn ni nun kutime aŭdas ĉe politikistoj :

- industria agrikulturo estas tio, kio nutras nin.

- ni devas denove trafi nian nutran sendependecon (kio signifas daŭrigi la aktualan sistemon kun tuta dependeco al petrolo kaj gaso).

Politikistoj ne hezitas diri, ke la kontraŭdirantoj al tiu sistemo estas krimuloj, teroristoj !



Marie, el la grupo de Lannion



## En koro de la valo kuŝas rifuĝejo de sovaĝa naturo

*Artikolo de ĵurnalo Ouest-France. 10.10.2025, tradukita de la grupo de Lannion*

Lasi la naturon libere evolui estas principo, kiu funkcias mirinde bone ĉe la rezervejo de Ploubezre, apud Lannion (22), rifuĝejo kaj karbona stoko. Antaŭ unu jaro, ĝi estis nomita laŭ la prestiĝa nomo Jane Goodall.

Komence de septembro, la tento eble estis granda pluki la rubusojn kreskantajn sur nia pado. Sed eniri la trankvilecon de la natur-rezervejo de Aspas (Asocio por protektado de sovaĝaj bestoj) en Ploubezre postulas, ke la promenantoj montru la plej grandan respekton por la loko kaj ĝiaj loĝantoj. Casado, fiŝkaptado, plukado kaj arbohakado estas malpermesitaj. Fakte, nur kontempligantaj promenoj sur la markita pado estas permesitaj. Regularo, kiun volontuloj regule diskonigas al migrantoj renkontitaj sur la pado.

### Unika oazo en Bretonio

Edukado estas parto de la agoj de tiuj « observantoj », kiuj gardas tiun pacejon por sovaĝa faŭno kaj flaŭro, protektita de ĉia homa agado ekde 2013. Kun siaj 60 hektaroj da arbaro kaj kampoj, kiuj etendiĝas laŭlonge de la rivero Léguer en Ploubezre, tiu rezervejo kreita sekve de donaco de la Fondaĵo Rosanbo, restas hodiaŭ unika en Bretonio.

Estis tiu ago, « tre engaĝita kaj nekonflikta sur la teritorio », kiu konvinkis la tre konatan Jane Goodall, antaŭ nur unu jaro, doni al ĝi sian nomon. « Io, kion ŝi ĉiam rifuzis ĝis nun por aliaj rezervejoj ! » Yolaine de La Bigne rakontas, sufiĉe fiera tiutempe trovinte la ĝustajn argumentojn kun la fama brita primatologo. Hodiaŭ, la reprezentantino de ASPAS des pli funebras la forpason de tiu granda sinjorino, la 1an de oktobro 2025, ĉar « ni ĵus eksciis, ke ŝi konsentis veni al Bretonio por inaŭguro de la rezervejo de Ploubezre... »

Sed kio okazas en tiuj fontaj valetoj, trazigzagataj de riveretoj ? Lasi la naturon repreni siajn rajtojn estas la ideo, kiu gvidas la agojn de ASPAS en ĝiaj klopodoj akiri bienojn en Francio, ekzemple en Drôme aŭ Trégor.

« Ricevi tiujn 60 hektarojn da tia riĉeco kiel donacon en Ploubezre estis escepta ! » rimarkis Blanche Bos. La projektdirektorino ĉe Aspas daŭrigas priskribante « multiparan lokon, karakterizatan per terpecoj kun alta arbardenseco, situantaj laŭlonge de akvovojoj, kiuj konsistigas interesajn vivejojn. »





## Naturo en libera evoluo

Hodiaŭ, tiu privata natura areo, kiu toleras promenantojn (kaj iliajn hundojn se ili estas tenataj per kondukŝnuro), estas rifuĝejo por eminentaj gastoj kiel la eŭropa lutro, la atlantika salmo kaj la kimpera heliko. Sed multaj aliaj specoj ankaŭ loĝas en la areo: alcionoj, flavaj motaciloj, cinkloj, regaloj, strigoj... Libera evoluo profitigas la pegon, kies kvin specoj nun ĉeestas ! ». La ASPAS-teamoj havas sufiĉe precizan ideon pri tio per la fotil-kaptiloj kontrolitaj tre regule kaj la studoj faritaj surloke.

## Stokado de CO2 : « bonegaj rezultoj »

La maloftaĵo de niaj rifuĝejoj plifortigas ilian sciencan intereson. « Notindas, ke estas tre malmultaj lokoj, kie la konservado de la naturo estas tiel kompleta : ofte, la natur-rezervejoj kaj naciaj parkoj ne estas ŝparitaj de ĉasado kaj fiŝkaptado », diras Blanche Bos.

Post la birdoj, la vespertoj estos detale studataj per akustika analizo.


« Ni volis ankaŭ scii la rolon de la rezervejo en la stokado de karbondioksido, mezurante ĝin de 2013 ĝis 2023, kaj ni estis impresitaj de la rezultoj », diras Blanche Bos.

En dek jaroj, 11000 tunoj da CO2 estis tiel absorbitaj, tio reprezentas 61 %-an kreskon. Kvankam tiu nombro bezonas esti firmigita. La studo rivelis, ke la rezervejo Jane Goodall tiel sukcesis stoki la ekvivalenton de « la averaĝaj ĉiujaraj 140 flugoj inter Parizo kaj Novjorko ! ». Pruvante, ke « kiam arbaroj kreskas libere, la avantaĝoj multas. »

Alvenante kvazaŭ rekompenco en oktobro 2024, la anonco pri la sponsorado fare de la senlaca brita sciencistino kaj aktivulino venis kiel taŭga omaĝo al la laboro entreprenita loke, laboro des pli urĝa en la kunteksto de biodiversec-falego kaj klimata ŝanĝo, faciligante adaptiĝon de naturaj vivejoj.

## Brajla skribo

En la jaro 2025 oni festis la 200-jariĝon de brajlo, skribsistemo inventita por blinduloj en 1825 de la tiam 16-jara franco Louis Braille. Versio de brajlo kun esperantaj literoj estis proponita de la sveda pioniro Harald Thilander ĉirkaŭ la jaro 1900, kaj ekde 1904 daŭre aperadas la brajla revuo Esperanto Ligilo.




## Kapitano Paul Watson.

Jam de kvindek jaroj Paul Watson batalas kontraŭ specio-malapero kaj akcelo de la klimata ŝanĝo. Li estas emblema figuro en la batalo kontraŭ balenĉasado.

Por eviti ekologian kolapson, li pledas por biocentrismo.

Kio ĝi estas ? Laŭ tiu filozofio, homoj ne estas en la centro de ĉio ; male, ilia supervivo dependas de la harmonio de iliaj interrilatoj kun ĉiuj vivantaj specioj, kaj bestaj, kaj plantaj, ktp.

En tiu libro, Paul Watson nun deziras transdoni sian scion kaj sperton pri ekologia aktivismo. Dum dek ses lecionoj, li instruas nin pensi malsame, elekti niajn batalojn kaj agi. Esenca majstro-klaso, kiu instigas nin konkrete kaj kolektive engaĝiĝi por la konservado de biodiverseco kaj la estonteco de la planedo.



Michel, el la grupo de Lannion

## Vojaĝo.

### La hispan-islamaj ĝardenoj

Mi vizitis hispan-islamajn ĝardenojn en Andaluzio en oktobro 2025. Tiuj ĝardenoj datiĝas de la romia epoko. Romiaj domoj ("vilaoj") estis organizataj ĉirkaŭ atrio, sub ĉielo, kvadrata korto kun kovritaj galerioj ĉirkaŭ ĝi, kaj baseno nomata "impluvio", kiu kolektis pluvakvon. Ĝi estis duonprivata akceptejo. En Andaluzio, la romianoj kreskigis olivarbojn kaj vitejojn. La islamanoj, kiuj alvenis en Hispanion en la 8-a jarcento (kaj restis tie ĝis la 15-a), reinterpretis tiun romian modelon, igante la korton privata, nur komunikante kun la ekstero de la domo tra koridoroj.

En moskeoj, danke al siaj basenoj (por rita sinlavo), la kortoj estas ankaŭ lavkortoj, kiel ekzemple en Kordovo.

Tiuj ĝardenoj havas ankaŭ distrajn kaj ofte utilajn funkciojn. La basenoj estas uzataj por stoki, aerumi kaj oksigeni akvon (kelkfoje el cisternoj), ankaŭ por akvumado kaj trinkado. La akvo malvarmigas la domojn kaj la ĝardenoj bonodoras danke al siaj aromaj plantoj.

Islamanoj alklimatigis multajn novajn plantojn en Hispanio (daktilujo, jasmeno, figarbo, cidonio, oranĝarboj...). Notindas, ke oranĝoj estis nur ornamaj fruktoj; dum jarcentoj ili ne estis manĝataj. La simbola aspekto de tiuj hispan-islamaj kortoj ankaŭ tre gravas. Ili estas reprezentaĵoj de la korana paradizo : ĉeesto de akvo, en la formo de fontanoj, kanaloj kaj basenoj, plantado de bonodoraj plantoj (laŭro, cipreso, jasmeno...), kaj fruktarboj (oranĝarboj, palmoj, cidoniarboj, figarboj...)

Tiuj ĝardenoj estas tre geometriaj kun abstraktaj formoj. Efektive, estas malpermesite bildigi bestojn kaj homojn. La kanaloj reprezentas la kvar riverojn de la paradizo. La fruktarboj kaj arboj simbolas la teran paradizon. La ĝardeno ankaŭ estas ligita al Dio, per la stela ĉielo super ĝi.

Ili estas pacaj kaj tre belaj lokoj. Vi povus pasigi horojn tie meditante.



Pierre -Yves, el la grupo de Lannion

## San Dewy



La unuan de marto, okazas granda festo en Kimrio kaj eksterlande : San Dewi (David). Anoj kuniĝas por celebri lumon kaj printempon. Simboloj de tiu nova tempo : poreo kaj jonkvilo aperas laŭlonge de vojoj, ĝardenoj kaj kiel ornamantoj sur vestaĵoj.

Jen popoldiro :

Gwisg Genhinen yn dy gap  
a Gwisg hi yn dy galon

Kimra lingvo

Lak ur rozenn-kamm war da dok  
ha mir anezhi ba' da galon

Bretona lingvo

Metu jonkvilfloron sur vian ĉapelon  
kaj konservu ĝin ene de via koro

Esperanto

En Bretonio loĝas kimra komunumo, kiu renkontiĝas kune kun kantistoj kaj muzikistoj en Plouye (apud Le Huelgoat) en *tavarn Ty Elise*. Je tiu okazo, Elise kuiras por ĉiuj *Cawl mod Kembre*, stufaĵon kaj *farz breton* senpage, la kimra sindonemo !  
Ŝanjo

## Farendaĵoj notindaj en via kalendaro

**Membrokunveno de FEB**

**11a de aprilo je la 10a**

**Saint Brieuc**



**Posttagmezon al la sovaĝa rezervejo de  
Plouberze**

**24a de Junio**

**Rencontres Espéranto**

**Plouézec**

**21-23 Août 2026**

**Congrès Espéranto France**

**Hérouville Saint Clair**

**22-25 Mai 2026**



**Universala kongreso 2026**

**Graz (Aŭstrio)**

**De la 1a ĝis la 8a de aŭgusto 2026**

<https://uk.esperanto.net/2026/>



**Bonvenon en la kulturdomo**

**Kastelo Greziljono**

**Printempas :**

**De la 17a de aprilo ĝis la 26a de  
aprilo**

**intensivaj kursoj kaj KER ekzamenoj.**

**Kursoj kun Zsofia, Birke, Marion kaj  
Pawel**

**de dimanĉo, 26-a de aprilo ĉ. 18h, ĝis  
sabato, 2-a de majo 2026 posttagmeze**

**Promenado bicikla kun BEMI**

**Ĥora kantado kun Interkant**

**Lerni E-on, praktiki Biblion**

**Basen-laboroj**

\*\*\*\*\*

**Informoj en**

<https://gresillon.org>

Pri ĉiuj eventoj en Esperanto en la tuta mondo, vizitu la retejon de Eventa Servo : <https://eventaservo.org>

Aranĝo : Hélène Dubois - 06-68-15-32-62 - [helene22dubois@gmail.com](mailto:helene22dubois@gmail.com) - 14 chemin de Land Gily 22300 Saint Michel en grève :

Prolegado Chantal Allen - 06-74-15-78-09 [chantalallen9@gmail.com](mailto:chantalallen9@gmail.com) korektado Josette Ducloyer [jducloyer@gmail.com](mailto:jducloyer@gmail.com)

N'attendez pas la prochaine édition, envoyez vos articles à Chantal dès maintenant pour les voir apparaître dans le prochain VT (par courrier ou par internet).